

Enhavo – obsah:

|                                   |    |                                      |    |
|-----------------------------------|----|--------------------------------------|----|
| J. Mráz: Sendu ĝin pluen          | 3  | J. Kavka: Sciencisto ĝuu poezion!    | 20 |
| B. Němcová: Pri malsaĝa Hanĉjo    | 4  | E. Urbanová: Dum longa vintro        | 20 |
| Z. Bergrová: Joĉjon ne tuŝi       | 7  | J. Holcová: El la Pragaj plej...     | 21 |
| Z. Bergrová: La virtuala Vyšehrad | 12 | K. Toman: Marto – Oktobro            | 23 |
| J. Karen: Serĉado de la Blua Tono | 16 | H. Tonkin: Skutečná jazyková rovnost | 24 |

La regulaj kunvenoj de la Esperantista Klubo en Praha okazas ĉiuĵaŭde en la kunvenejo en Praha 1, Ve Smečkách 25, kun jena programo:

13 – 14 h Libera tribuno – novaĵoj pri Esperanto, ĝeneralaj informoj, organizaj aferoj, ambaŭlingve

14 – 16 h Gramatiko kaj ekzercado de konversacio, nur en Esperanto

16 – 18 h Kurs opor komencantoj – gvidas s-anino Marta Šmidrkalová

Atenton!

Somere, en julio kaj aŭgusto, la kunvenoj de nia klubo ne okazos. La unua postsomera kunveno okazos denove ĵaŭde la 4-an de septembro 2003.

Pravidelné schůze Klubu esperantistů v Praze se konají každý čtvrtek odpoledne v Praze 1, Ve Smečkách č. 25.

Po dobu letních prázdnin, tj. v červenci a v srpnu se schůze klubu nekonají.

Esperanto ve vesmíru

V současné době je známo na 160 tisíc asteroidů neboli planetek. „Planetky jsou malá tělesa sluneční soustavy, pohybující se kolem Slunce po eliptických drahách a nejevící kometární aktivitu.“ Z nich bylo na 33 tisíc očíslováno a na 9 tisíc pojmenováno. Z nich dvě planetky mají názvy vztahující se k mezinárodnímu jazyku esperantu. Jsou to planetky Esperanto a Zamenhof (jméno tvůrce esperanta). Objevil a pojmenoval je finský astronom v Turku prof. Y. Väisälä, a to Esperanto v roce 1936 a Zamenhof v roce 1938.

Planetka **Esperanto** má pořadové číslo 1421, její velikost je zhruba 20 x 50 km, je vzdálená 435 milionů km od Slunce, kolem kterého oběhne za 5 roků a 175 dní.

Planetka **Zamenhof** má pořadové číslo 1462, je velká asi 10 x 30 km, od Slunce je vzdálená 455 milionů km a kolem Slunce oběhne za 5 roků a 217 dní. Rovina její oběžné dráhy svírá s rovinou oběžné dráhy Země úhel 1°. Planetka má jasnost 17. Stupně.

Obě planetky Esperanto a Zamenhof se k sobě přibližují vždy za 186 let; naposledy tomu bylo roku 1840, takže k příštímu přiblížení dojde v roce 2026.

### Informoj

La ĉi-jara **jarkunveno** de nia klubo okazis la 27-an de marto en la kunvenejo Ve Smečkách 25. La kunvenon partoprenis 32 klubanoj. La ĉeestinta membro ing. Zintl festis ĝuste sian 83-an naskiĝtagon kaj regalis nin per torto kaj vino.

La raporto pri agado de la klubo estis publikigita jam en la antaŭa numero de Bulteno.

En la diskuto d-ro Chrdle salutis la kunvenon en la nomo de ĈEA kaj de Richard Howard el Britio. Li prezentis novajn librojn, kiujn lia eldonejo KAVA-PECH eldonis, kaj ankaŭ la turismajn aranĝojn, kiujn lia firmao preparis.

Ing. Pluhař informis, ke la asocia Libroservo havas novajn ejojn en Dobřichovice.

J. Vychodil informis pri aktivech de nevidantaj esperantistoj (i. a. aperis nova lernolibro por nevidantoj) kaj donacis al la klubo Esperantajn librojn.

Estis elektita nova komitato de la klubo kun nova prezidanto:

|                |                         |
|----------------|-------------------------|
| prezidanto:    | Ing. Josef Trojan       |
| vicprezidanto: | Jiří Patera             |
| kasisto:       | Jindřich Ondráček       |
| propagandisto: | Mgr. Bohumil Bouzek     |
| kursgvidanto:  | Ing. Jaroslava Blažková |
| komitatano:    | D-ro Petr Chrdle        |
| revizoro:      | Helena Maudrová         |

Laŭ laborplano la klubo aranĝos unufoje monate vesperan kunvenon, por ke povu partopreni ankaŭ laborantaj membroj. Estos plu eldonata Bulteno, la klubo mendos du – tri Esperantajn gazetojn, kiuj estos je dispono de klubanoj. Plue la membroj povos pruntepreni Esperantajn librojn el la nove aranĝata kluba biblioteko.

La 25-an de aprilo multaj geesperantistoj el diversaj lokoj partoprenis la solenaĵon honore al la granda ĉeĥa verkisto Karel Čapek, en la somerdomo Strž de K. Čapek apud Dobříš. Oni ĝuis deklamadon el verkoj de Čapek kaj vidis la meblitajn ĉambrojn kun memoraĵojn pri Čapek kaj diversajn eldonojn de liaj verkoj, ankaŭ en diversaj lingvoj, inter ili ankaŭ en Esperanto.

---

### Esperanto en la Radio

Radio Polonia **Varsovio** en Esperanto ĉiutage

17.00 – 17.25 h per kurtaj ondoj 7270 kHz kaj 7285 kHz (t.e. 41,26 m kaj 41,18 m) kaj la programon ripetas je la 20.00 – 20.25 h per la kurta ondo 7285 kHz (t.e. 41,18 m).

Ĉina Radio Internacia **Pekino** elsendas en Esperanto ĉiutage

22.00 – 22.30 per kurtaj ondoj 11810 kHz, 11730 kHz kaj 9965 kHz (t. e. 25,40 m, 25,58 m kaj 30,11 m).

Aŭskultu la esperantlingvajn radio-elsedojn!

---

Atenton!

La bestkuracisto Kamil SCWETTER malfermis nova, modernan, veterinaran klinikon. Se viaj bestetoj havos ian san-problemojn, bonvolu viziti lin:

Praha 4 – Nusled, Boleslavova 20

lunde-vendrede 9-12, 13-20

sabate 10-15

dimanĉe 15-19

tel. 241 401 000, poŝtel. 724 127 404

Jaroslav Mráz

### **Sendu ĝin pluen**

Fine de aprilo estis okazanta en Industria plalco en Prago grandioza librofoiro „La mondo de la libro“. Merite de ĉeĥa poetino kaj eldonistino Věra Ludíková estis tie aranĝita ankaŭ ekspozicio de la Esperantaj libroj.

Okaze de tiu ĉi ekspozicio sinjorino Ludíková organizis belegan posttagmezon, konsistantan el du partoj. Je la 15-a horo okazis programo, akompananta la Esperantan ekspozicion. La programon malfermis s-ano Jiří Patera. Siajn kontribuojn prezentis dr. Petr Chrdle (pri Esperanto ĝenerale, Jiří Patera (pri la spirita proklamo de la poetino Věra Ludíková „Sendu ĝin pluen“ en la ĉeĥa lingvo kaj en Esperanto) kaj Miroslav Malovec (Esperanto en interreto). Fragmentojn el la proklamo de Věra Ludíková Sendu ĝin pluen ĉeĥlingve kaj en Esperanto kaj poemojn de Eli Urbanová, Čestmír Vidman, jam forpasinta Jiří Karen kaj Zdenka Bergrová deklamis Miroslav Smyčka kaj Josef Vích, kiuj prezentis ankaŭ kantajn programojn Akordionlude akompanis Josef Vích.

La unuan parton de la programo fermis Jiří Patera, kiu invitis la ĉeestantojn al la vizito de la ekspozicio.

Tuj poste komenciĝis la dua parto de la programo – aŭtoro legado el la libro de Věra Ludíková „Sendu ĝin pluen“.

Kiam ankaŭ iu tempo mi estis tradukanta tiun ĉi mesaĝon, mi tute ne supozas, kia estos la rezulto de tiu ĉi proklamo, nome gelega libro, 192-paĝa kun multaj ilustraĵoj. La mesaĝo aperis ĉeĥlingve kaj en dek tradukoj, inter ili ankaŭ en la Esperanta. Krom tio tre multaj aliaj aŭtoroj kontribuis al la libro per siaj propraj „mesaĝoj al la homoj kaj al la universo“ (el la subtitolo de la libro), entute 83 (inkluzive de la ilustrintoj). Jam laŭ tiu ĉi nombro estas evidente, ke temas pri respektinda libro, akompanata per belegaj ilustraĵoj de Zdeněk Hajný (posedanto de grava praga galerio), Jan Kristofori, Věroslav Bergr kaj multaj aliaj. La libron estas rekomendinde ne nur tralegi, sed ankaŭ trastudi, ĉar la pritrakto de la temo deferencas de aŭtoro al aŭtoro.

En la programo prezentiĝis multaj el la aŭtoroj. Ĉiuj programeroj havis komunan trajton: sopiron pri la paco kaj la amon al la homoj. El la poetoj, konataj al niaj esperantistoj, ĉeestis Zdenka Bergrová, Věra Ludíková, Eli Urbanová kaj Čestmír Vidman. Bedaŭrinde por ĉiam mankas inter ili Jiří Karen.

La programerojn estis enkondukanta Jaromír Husák. Ankaŭ tiu ĉi parto de la programo estis plena de muziko: karpludis Jiří Vyšata, kantis Renata Jandová, Miroslav Smyčka kaj Josef Vích.

La mirinda posttagmezo finiĝis je la 17-a horo. Pri la tuta arta programo pelj multe meritis Věra Ludíková, favorantino al Esperanto. Precipe estas necese aprezi ŝian grandan laboron kaj klopodon ĉe la prilaborado de la komplika libro, la organizo de la Esperanta ekspozicio kaj de la tuta programo, kiu estis en plena akordo kun la ĉefa tasko kaj misio de Esperanto. Ĉiuj partoprenintoj foriris ege kontentaj pri la belega posttagmezo.

*Transprenita el INFORMILO, monata gazeto de E-Handikapuloj*

Božena Němcová

## Pri malsaĝa Hanĉjo

Estis iu patro kaj li havis Hanĉjon. Foje li diris al li: „Hanĉjo, ci kreskas kiel la ligno en arbaro, ci estas alta ŝtupo, kaj ĝis nun ci eĉ en la preĝejo ne estis. Hodiaŭ ci iros en la preĝejon. Sed mi diras al ci, tie la buŝon ci eĉ ne movos.“

Hanĉjo skuis la kapon, vestis sin kaj iris en la preĝejon. Post momento, post kiam li eniris en la preĝejon, enpaŝis pastro en ambonon kaj komencis prediki. Hanĉjo rigardis kun malfermita buŝo, sed post mallonga tempo li malsereniĝis, metis la manojn al la koksoj kaj grumblis: „Nu, mi volonte sciis, kial la ĉemizulo nur al mi gapas kaj kun mi disputas; mi ja nenion faris al li, sed se tio daŭros longe, ni ekluktos.“

„Nur silentu, malsaĝulo, kaj aŭskultu,“ admonis lin homoj.

„Vere mi ne aŭskultos tion, eĉ vorton mi ne volas plu scii.“ Kaj li surkapigis sian ĉapelon, ambaŭ poleksojn li ŝovis en la orelojn kaj turnis sian dorson al la pastro. Kiam li faris tion, la homoj elpuŝis lin el la preĝejo.

„Ĉu ci jam venas?“ demandis la patro.

„Mi ĝojas, ke mi jam estas hejme, kiom da fortostreĉo tio kostis min. Enŝoviĝis tie ĉemizulo en tinon kaj komencis fanfaroni kaj kun mi disputi ĝisterure. Nur unufoje mi movis la buŝon, kaj la homoj min admonis, kaj kiam mi la orelojn ŝtopis, ili elpuŝis min eksteren. Neniam plu mi iros tien.“

„Ci estas malsaĝa Hanĉjo. Vespere ci iros al dancamuzo.“

Bone vespere la patro donis al Hanĉjo florenon kun aldono, ke li aĉetu por ĝi bieron kaj knabinojn li multe trinkigu, por ke ili ŝatu danci kun li.

Hanĉjo iris; ĉe la sojlo de gastejo staris la verŝisto. „Por floreno bieron!“ ordonis Hanĉjo, apenaŭ li venis al li.

„Eble nur pindon,“ korektis la gastejestro.

„Mi jam diris kaj sufiĉe!“ Hanĉjo al tio.

„Nu bone, iru pluen!“

En la gastejo estis nur violonisto kaj kelkaj paroj turnis sin en rondo. Hanĉjo larĝe eligis la okulojn, malfermis la buŝon kaj gapis. Subite ekŝrikiis sakfluto el la antaŭĉambro kaj la sakflutisto enpaŝis en la ĉambron, akompanata de junularo. Kiam tion Hanĉjo ekvidis, li ĵetis sin el la ĉambro, ĝis li ĉe la sojlo faligis la gastejestron, kiu portis por li en sitelo bieron por la floreno.

„Patro,“ li kriis veninte hejmen, „neniam plu sendu min al dancamuzo, kiom mi ektimis tie.“

„Nu, ci stultulo, kio estis?“ demandis la patro.

„Ho kio; kiam mi venis tien, grincis tie iu per tabuleto kaj kelkaj frenezuloj turnis sin tra la ĉambro, mirige, ke ili ne sentis la kapturton. Subite aŭdiĝis ekŝriko, la frenezuloj ĉiuj pro timo ekkriis kaj puŝis sin al la pordo; en ĝi ekstaris ulo kaj premis diablon subbrake. Mi ektimis kaj kuris for.“

„Mi jam vidas, ke en la vilaĝo ci ne sukcesos bone, ci devas inter sinjorojn. Mi konas unu, kiu bezonas ĉambroserviston, al tiu mi kondukos cin.“ Hanĉjo estis kontenta kaj iris kun la paĉjo provi sian bonŝancon inter sinjoroj. Ili venis al bela kastelo kaj tie la paĉjo diris, ke Hanĉjo iru peti la servon.

Ĉe la pordo staris pordisto kaj demandis Hanĉjon, kiel li nomiĝas.

Eh, kial mi dirus, kiel mi nomiĝas, li ja ne estas sinjoro, ekpensis Hanĉjo enmense. „*Antaŭhierau* mi nomiĝas,“ li respondis al la pordisto kaj iris supren al la sinjoro.

„Kiel ci nomiĝas,“ demandis lin la sinjoro, post kiam li akceptis lin en la servon.

„Hanĉjo.“

„Tio ne estas bela, Hanĉjo, ni diros al ci Johannes!“

„Nomu min, kiel vi volas, sed voku min Hanĉjo, ale mi ne aŭdos.“

La sinjoro ridis, ordonis al li laboron por la tutat ago kaj Hanĉjo foriris. Li venis en kuirejon kaj la kuiristino tuj demandis, kiel li nomiĝas.

Hanĉjon la demandado tedis, li do diris: „kion vi ŝatas, *Bona vino*.“

Kiam li venis supren en ĉambrojn, renkontis lin la sinjorino. „Aĥ, nia nova lakeo; kiel oni nomas cin?“

„Oni nomas min Johannes, sed mi nomiĝas *Kato*,“ respondis Hanĉjo, tute kolera, ke li devas ĉiam diri, kiel li nomiĝas.

„Tiu viraĉo estas frenezulo,“ ekpensis la sinjorino kaj iris pluen.

Venis fraŭlino kaj ordonis: „Mi volas supon!“

„Mi estas *Supo*,“ diris Hanĉjo, al kiu la junulino ekplaĉis.

„Ci do havas strangan nomon,“ diris la fraŭlino, „sed mi ne demandas pri ĝi, sed mi volas, ke ci alportu al mi supon el la kuirejo.“

„Miavole, la bubinon mi tuj edzinigus, se ŝi volus min,“ ekpensis Hanĉjo, portante la supon, kaj pensis pri ŝi la tutan tagon. Vespere, kiam finiĝis ĉiuj laboruj kaj ĉiuj enlitiĝis, li ŝovis sin malrapide tra kelkaj ĉambroj en tiun, en kiu la fraŭlino dormis.

„Panjo, panjo, *Supo!*“ kriis la fraŭlino al la patrino, kiam ŝi ekaŭdis la paŝojn kaj ekkonis la serviston.

„Eble vi ne manĝus ankoraŭ nokte supon?“ aŭdiĝis la patrino el la apuda ĉambro.

„Rapide, panjo, la nova servisto estas ĉi tie.“

„Leviĝu rapide, mia karulo, *Kato* estas ĉe la filino,“ vekis la sinjorino la sinjoron.

„Kial vi vekas min, ŝi forpelu ĝin.“

„Kiel ŝi forpelus lin, li ja ne estas vera kato; eble vi komprenas min, estas li, la nova servisto.“

„Li nomiĝas Johannes, kaj ne *Kato*.“

„Nur leviĝu, li nomiĝu iel ajn, li estas tiu.“

La sinjoro Leviĝis, prenis vipon de sur la muro, kaj kuris en la ĉambron de la fraŭlino, sed tie neniu plu estis kaj nur la fraŭlino rakontis al li, ke la servisto venis al ŝia lito, kaj kiam ŝi kriis, li fuĝis.

Do la sinjoro akuris post lin; sed sub la ŝtupoj li falis trans kuiristinon. „Vi senhonta, kial vi kuŝas ĉi tie? Kiu vin faligis?“

„*Bona vino, moŝta sinjoro.*“

„Kaj ĉu vi ankoraŭ diras tion al mi? Post kiam mi revenos, ni kvitlos, vi senhontulino!“

Kaj li kuris post Hanĉjo, sed li nenie estis. Li demandis la pordiston, ĉu li vidis la serviston.

„*Antaŭhieraŭ?*“ demandis la pordisto, kiu la veran nomon ne sciis, samkiel la kompatinda kuiristino.

„Vi estas azeno, antaŭhieraŭ li ĉi tie ankoraŭ eĉ ne estis,“ ekkoleris la sinjoro. Nur post longa pripensado li divenis ĉion kaj la kolero fine ridigis lin, ke Hanĉjo faris pri ili amuzaĵojn.

Dume Hanĉjo venis hejmen tute kurŝvitega.

„Nu, ĉu ci jam revenas el la servado?“ demandis la paĉjo.

„Mi ankoraŭ ne venus, se mi timis batregalon. Ili havas tie filinon, kaj ŝi estas diable bela, ŝi plaĉis al mi kaj mi vespere vizitis ŝin kaj volis kisi ŝin. Sed ŝi komencis kriegi, kvazaŭ oni volus per forkego piki ŝin, kaj ŝi alvokis la tutan kastelon. Mi devis fuĝi, por ne ricevis batpunon.“

„Nu, ci estas dia ŝtipo, mi ne plu scias, kion kun vi,“ ekkoleris la paĉjo.

„Paĉjo, mi scias, kion mi faros,“ diris al tio Hanĉjo, „en la kastelo mi aŭdis pri iu reĝo, kiu laŭdire kunvokis multajn klerulojn por disputi kun ili. Ili diru ion ajn, li ĉiam respondas: „Tio estas vero,“ kaj se al iu li diras: „Vi mensogas!“, tiu laŭdire venkos kaj al tiu li donos aŭ multe da mono, aŭ sian filinon. Mi iros tien kaj disputos kun li, ĝis li diros: „Vi mensogas!“

„Nu eble vi taŭgas por tio. Iru nur, adiaŭ!“

Hanĉjo do ekiris al la reĝo, fama pro disputado. Feliĉe li venis tien kaj estis allasita al la reĝo.

„Ĉu ci do volas disputi kun mi?“ demandis la reĝo.

„Nu, mi provos tion,“ diris Hanĉjo kaj sidigis sin apud la reĝo sur remburitas seĝon.

„Nun komencu rakonti, kaj se mi diros, ke ci mensogas, ci ricevos mian filinon kaj multe da mono,“ diris la reĝo kaj mansignis al Hanĉjo, ke li komencu.

„Foje mi iris en arbaron kaj faligis kverkon,“ komencis Hanĉjo.

„Tio povas esti vero,“ diris la reĝo.

„El ĝi estis tiom da segaĵpolvo, ĝis mallume!“

„Ankaŭ tio povas esti vero.“

„El tiuj segaĵoj mi plelis ŝnuron.“

„Eĉ tio povas esti vero.“

„La ŝnuron mi alligis al la ĉielo kaj grimas sur ĝi supren.“

„Tio ankaŭ povas esti vero.“

„Supre peceto da ŝnuro mankis, do mi fortranĉis pecon sube kaj supre alligis ĝin.“

„Ankaŭ tio povas esti vero.“

„Jam mi estis kaptanta trabon, kiam la ŝnuro ŝiriĝis kaj mi falis kaj enpuŝiĝis cent klaftojn sub la teron.“

„Kaj ankaŭ tio povas esti vero.“

„Mi rememoris, ke ni havas en la kuirejo hakfosilon, do kun emo mi elgrimpis por elfosi min.“

„Tio povus esti vero.“

„Elirinte, mi vidis kuri leporon, kaj tiu havis sur la kolo paperfolieton.“

„Tio povas esti efektiva vero.“

„Kaj sur la opereto estis skripte, ke via paĉjo kun mia avo paŝtis porkojn.“

„Ci mensogas,“ ekkriis la reĝo kaj saltleviĝis de la seĝo.

„Ĉu mi mensogas? Tiam vi malvenkis, kaj mi ricevos monon.“

Jen la reĝo ektimis kaj nur tiam li rememoris pri sia veto.

„Aŭskultu, Hanĉjo, mi donos al ci sufiĉe da mono, sed la filinon mi ja ne povas edzinigi al ci; ci estas kamparano, sed ŝi estas reĝidino.“

„Nur donu al mi la monon, mi ne bezonas vian reĝidinon, ĉar mi scias pri pli bela junulino.“

La reĝo estis kontenta eĉ kun tiu ĉi komplimento, donis al Hanĉjo tiom da mono, kiom li volis, kaj ĝojis, ke li senigis sin de li. Kiam Hanĉjo venis hejmen, li aĉetis al si grandbieron kaj havis eĉ tro da saĝo.

Tradukis J. Patera

Zdeňka Bergrová

Joĉjon ne tuŝi

„Per neniuj nifoj vi surprizos min, ĉio estas nur mistifikaĵo,“ diris Karlo kaj arogante li ekrigardis la sinjoron nifologon.

Infanoj sidis kun la multŝatata vizitanto, doktoro de sciencoj kaj ankaŭ adepto de kuriozaj fenomenoj, kies kernon la scienco ne kapablas trovi – en la astronomia observatorio sur Petřín.

„Neniu devigas vin kredi, ke ie en la senfina universo ekzistas simila fenomeno, kiel la vivo sur la tero,“ respondis la doktoro.

„Sed estus strange, se ĝi ie tie ne ekzistus, tion diras la sinjoro doktoro tre bone,“ aŭdigis sin Magda.

„Tie ie, mi ne diras, ke tie ie ĝi ekzisti ne povas,“ daŭrigis Karlo. „Sed ke la homoj de tie ĝenus sin per vizito al ni, farus ĉi tie bruon dum alteriĝo, aŭ ion sekretan, eble cirklojn en grenkampoj, tio estas sensencaĵo.“

„Sed kiu laŭ vi faras la bildojn en la greno, kiu,“ objetis Zora.

„Vandaloj.“

„Sed,“ rimarkigis la doktoro, „al la bildoj estas de nenie libera aliro. En tio estas la mistero.“

„Eble el helikoptero oni povus ilin fari,“ aŭdacis diri Vraĉjo. Li ne volis lasi Karlon senhelpa, kiam la ceteraj infanoj aprobis la dirojn de la doktoro.

„Tio ankoraŭ ne estas perfekte esplorita,“ konsentis la nifologo.

„Kiel statas la afero de la praeksplodo,“ demandis Stanĉjo.

„Laŭ teorio de iuj astronomoj okazis en la komenco de la ekzistado granda praeksplodo, kaj pro tio la universo ĉiam ankoraŭ ekspansias,“ respondis la doktoro nifologo. „Kaj ke ĝi ekspansias, estas pruvite.“

„Nu, bone,“ ekparolis denove Karlo, „sed se ĉe la komenco estis la praeksplodo, kio estis antaŭ la praeksplodo!“

„Mi vidas, ke de vi eskapi ne eblas,“ ekridis la doktoro de sciencoj, „ree mi devas konfesi, ke ankoraŭ ne ĉio estis esplorita.“

„Estas same kiel pri la fino de la universo. Se ĝi ne estus finhava, kio estus post ties limoj,“ ekridis Anĉjo. „Vi diris, ke iaj pluaj universoj. Universoj, universoj...“

„Ĝuste, sed tio min iom forkondukas de la konsidero, ĉu ni volas, aŭ ne volas kredi, ke super la tero aperas nekonataj objektoj, kiuj moviĝas. Oni trovas, ke ĝi ne povas esti polusa aŭroro nek ia aviadilo – kaj tial ni povas nur kredi aŭ ne kredi, ke ĝi estas NIFO,“ aldonis la doktoro.

En tiu momento venis en la observatorion Andreo – kaj ne sola. Akompanis lin neordinara knabo.

„Ili jam estas ĉi tie,“ aŭdigis sin tuj kelkaj infanoj. La plimulto el ili preskaŭ ĉiam silentis, sed nun estis la ĝusta momento por aŭdigi sin.

La sinjoro doktoro de sciencoj ne venis en la observatorion pro nenio. Invitis lin ĉi tien la direktoro de la observatorio mem, kiam la instruistino de la infanoj sciigis al li strangan aferon. Ĝi okazis al Andreo. Sed pro tio ni devas komenci alimaniere.

Andreo estis maldika knabo kaj en la lernejo lin ofte subpremis kruduloj. Oni nomas tion ĉikanado. Andreo neniam plendis, sed ne pro tio, ke li timus la Veron – kvankam li timis ĝin ankaŭ. Sed plie la plendado malplaĉis al li. Foje la buboj enpremis lin en angulon kaj en tiu momento aperis ĉe ili instruistino.

„Kion vi faras,“ ŝi frapdemandis ilin.

La buboj diskuris, sed tamen la instruistino taŭzis ilin. Ŝi eĉ skribis pri la evento al iliaj gepatroj.

Ie la buboj restis senpunaj, tio ne estas bona, aliloke ili ricevis batregalon, tio ankaŭ ne estas la plej bona. Kiam ili ricevas malgrandan batadon, tiam ili nur obstiniĝas, kiam tre grandan.... nu ni lasu tion. Kion propre povas plenaĝuloj fari, por ke el la buboj ne kresku krudeluloj? Plej bone ordigas ilin la samlernejanoj. La tuta klaso devas kontraŭ tiaj buboj unuiĝi. La ĉikanadon simple ne permesi al ili.



Andreo havis absolutan aŭdosenton kaj longajn suprajn fingrojn. Ĉu vi ne scias, kio estas la absolutna aŭdsento? Li ne devis uzi agordilon kiel ceteraj homoj, kiam ili volas aŭdi, kiel sonas la ĉambra a. Tio estas grava por ĥoroj, por ke la kantistoj povu komenci ĝuste kaj ne tiru la orelojn de la aŭskultantoj per tio, ke ĉiu kantus, kiel li mem ekdezirus. Pro tio la ĥorestro havas la agordilon, blovas en ĝin kaj aŭdiĝas la ĉambra a. Ĉiuj komencos egale. Iuj homoj havas de la naturo la donacon aŭdi la ĉambran a ĉiam ĝuste mem – sen la agordilo. Ili havas la absolutan aŭdosenton. Kaj Andreo apartenis inter ilin. En la familio li ne estis sola. Lia paĉjo ludis la unuan violonon en ĉambra orkestro, ankaŭ la absolutan aŭdsenton li havis. Verdire havas, ĉar ili ankoraŭ ne mortis.

Memkompreneble la patro de Andreo deziris, ke la bubo baldaŭ komencu violonludi. Sed – mondo miru – Andreo ne volis. Sed kial li ne volis? La belan muzikon, kiun oni senbezone nomas serioza, dum ĝi estas simple nur la plej bela, tiun li aŭskultis treege volonte, ekde la infanaĝo li sciopovis funkciigi per butono la ricevilon. Sed mem lerni la ludadon de violono, tion ne. Tion por neniu kosto. La paĉjo koleus, la panjo koleus, ne, li ne volis. Kaj ĉu vi scias kial? Ludi violonon estas sufiĉe malfacile. Komence oni ofte tuŝas aliloke, ol oni devas, kaj tiam aŭdiĝas falsa tono. Brr. Tion Andreo ne toleris. Kaj tial li restadis ĉe la muziko je butonoj.

Foje venas Andreo el la lernejo hejmen, iras en sian ĉambron – kaj tie sidas nekonata buto – tre stranga. Li estas diafana, sed ne nur tiom maldika, vere estas kvazaŭ tranebule vidĉio, kio estas malantaŭ la bubo.

„Tra kie vi venis ĉi tien?“ diras Andreo kaj ankaŭ sidigas sin.

„Tra la fenestro.“

„Ĉu vi estas ŝtelisto?“

„Mi ne estas.“

„Do kiu vi estas. Kiu estas via nomo kaj kion vi faras ĉi tie.“

Momenton estis silento.

„Ĉi tie vi nomas nin nifo-anoj. Sed al mi tio ne plaĉas, ke vi diru al mi nifo-ano. Diru al mi, kiel vi volas, sed nur ne nifo-ano.“

„Nu strange,“ diras Andreo. „Ĉu mi devus alvoki la panen?“

„Ne, dume mi petas vin, ne,“ balbutis la diafana bubo. „Donu al mi nomon.“

„Do eble – la sofisto Sekalo.“

„Sekalo ne plaĉas al mi, tio estas kvazaŭ mi farus la cirklojn en la greno. Sed mi ne faras ilin.“

„Mi dediĉus al vi la nomon Akcipitro, ĝi estas laŭ iu glora verkisto, sed vi ne kapablas pronaci la songrupon –kc-, do tio ne konvenus. Do eble Joĉjo.“

„Eble, eble Joĉjo. Kaj vi estas...“

„Mi estas Andreo... Sed nun parolu, kion vi faras ĉi tie.“

„Nu mi estas tiu – kiel vi diras al ni nifo-anoj. Ili elŝipigis min ĉi tie. Mi volis en la universon. Vi ĉi tie volas ĉiuj en la mondon, ni en la universon.“

„Kial vi scipovas ĝuste ĉeĥlingve. Ni estas malgranda nacio. Por vi estus pli bone en Ameriko.“

„Tute ne. Tien ne troviĝas malnovaj burgoj kaj kasteloj. Prago estas la plej bela. Krome eble ankoraŭ Parizo.“

„Nu, vi eble pravas.“

„Mi aŭskultis ĉi tie muzikon, ĝi estas bela.“

Nur nun Andreo rimarkis, ke la ricevilo ludas.

„Ĉu vi scipovas tion ankaŭ?“ demandis Joĉjo.

„Ne, tute ne. Sed mi scipovas aŭskulti. La buboj estas plejparte por la dura muziko, por perkutinstrumentoj, por grandega bruego.“

„Sciu, mi volus tion ellerni. Ne perkutilojn, sed tion, kion ili ĝuste ludas. Ĉe ni estas ĉio pli bona ol ĉi tie, kion mi dume vidis, sed la muzikon vi havas pli bonan.“

Dum mallonga tempo la buboj interparolis, sed poste nur tamen Andreo alvokis la panjon.

„Kion vi diras??“ ŝi miris.

Sed ŝi mem vidis, ke la bubo el la universo estas diafana, tial ŝi devis kredi.

„Panjo, ni lasos lin ĉe ni ĉu jes.“

„Nu eble jes, sed nur poste, kion diros la paĉjo.“

La paĉjo estis por. Sed li havis kondiĉon.

„Andreo, jen Joĉjo ŝatus lerni violonludi. Sed vi ne volas. Kio do, se vi provus tion kune.

Al Andreo restis nenio alia, ol promesi, ke ili komencos tuj morgaŭ.

„Kaj nun dormi, buboj,“ diris la panjo.

Kaj post kiam ili satdormis, Andreo kunprenis Joĉjon en la lernejon.

Dio mia, kia estiĝis konsterniĝo. Ĝi estis artfajraĵo. Ĉiuj observis Joĉjon, nu mireginde. Ili nur ne rajtis tuŝi lin. Tion Joĉjo ne permesis. Sed li ja estis neniu fortulo? Kaj tamen li scipovis tion aranĝi.

„Kiam iu volos tuŝi min, Frans lin fulmo. Por pli granda distanco nur malforta, sed se iu irus pli prokrmen, tiam mi garantias nenion, la elektro povas lin eĉ mortigi,“ sciigis Joĉjo.

Iuj buboj, ĉefe la kruduloj, ne obeis la averton, ili opiniis, ke Joĉjo nur fanfaronas, do tial ili provis tion. Sed li ne fanfaronis. Ili ricevis kurento-fracon. Ho Dio, kiom ĝi formikis.

Al Andreo kaj al knabinoj Joĉjo permesis veni multe pli prokrmen. La kruduloj nur rigardaĉis. Andreo tuj fariĝis pli admirata. La kruduloj ne trovis admirindaj la knabinojn eĉ nun, ili simple la knabinojn subtaksis.

Fine ne la knabinoj, nek Andreo kaj poste nek la instruistino povis proksimiĝi al Joĉjo absolute.

La instruistino diris:

„Joĉjo certe interesus astronomojn. Mi telefonos al observatorio, kion vi diras, infanoj.“

La infanoj ektondris hura.

Kaj tial efektiviĝis la fama kunveno en la astronomia observatorio de Petřín.

La sinjoro doktoro de sciencoj iom leviĝis, kiam Andreo kaj Joĉjo eniris. Li ĉiam opiniis, ke temas pri la ŝerco aŭ eraro, sed nun li vidis...

„Bonvenon al vi, sinjoro Joĉjo,“ li ekpepis. „Bonvolu sidigi vin.“

Joĉjo iom antaŭŝovis Andreon. Nur post li ankaŭ sidigis sin.

„Ĉu vi povus afable prezenti al ni la bazajn donitaĵojn pri via hejmplanedo – aŭ eble stelo...“

„Tion mi ne povus, mi ja ne multon scias,“ respondis Joĉjo.

„Ne estas eble, ne estas eble,“ respektplene oponis la doktoro nifologo. „Tia altvalora vizito – kaj por ni tia altvalora okazo ascii ion pri la vivo en la universo...“

„Sciu, mi sopiris veni ien sur alian planedon, sed mi ne estis diligenta kaj mi scias preskaŭ nenion pri la mia propra. Nur nun mi trovas, ke eble devis vojaĝi iu pli bona. Mi estas filo de la ĉefinĝeniero de vojaĝoj, kaj tial, post kiam mia patro post kelkaj propraj ekskursoj en la universon feliĉe revenis kaj certigis, kion oni povas kie aranĝi, tiam li permesis al mi ... mi tre bedaŭras, mi estos neniel utila al vi,“ pentoplene konfesis Joĉjo.

„Sed ni povus almenaŭ mem pri multo konvinkiĝi...“

„Kion vi pensas per tio,“ ektimis Joĉjo.

„Permesu al mi tuŝi vin...“

„Ĝuste tio ne eblas,“ firme diris Joĉjo. „Tuj kiam vi tuŝus, mortigus vin elektra kurento, vi forbrulus. Kaj eĉ – se vi devigus min, ke mi lasu min iel esplori – tial mi estas aranĝita tiamaniere, ke mi malaperos.“

„Tion vij a ne farus al ni,“ ne lasis sin rifuzi la doktoro nifologo. „Ni tiom sopiras je la science ekkono...“

„Mi malaperos hejmen en la universon.“ Kaj Joĉjo ekŝvebis iomete super la plankon.

„Vi ja volis kunpreni la violonon kaj magnetofonon kaj bendojn...“ preskaŭ ekkriis Andreo.

„Mi volis, mi volis, sed la niaj ne lasos min ĉi tie, la doktoro esplorus min kaj volus esplori ankoraŭ pli,“ ekĝemis Joĉjo.

„Ni ja faras multajn esplorojn, centojn, milojn,“ obstine daŭrigis la nifologo.

„Adiaŭ, Andreo,“ vokis Joĉjo kaj ŝvebis pli alten kaj pli alten.

La infanoj elspiris oooĥ.

Kaj Joĉjo malaperis. Li aerdisiĝis.

„Vi fortimigis lin,“ lamentis Andreo kaj riproĉe rigardis la nifologon.

„Stultaĵo,“ eldiris Karlo. „Ĝi estis ia mistifikaĵo“

Sed ĝi ne mistifikaĵo.

Ĝi estis fabelo.

Zdeňka Bergrová

## La Virtuala Vyšehrad

Johanon kaj Jakobon interesas eksperimentoj kaj ĉio mistera altiras ilin. Ili estas amikoj, sed interretaj. Johano estas nagano, eŭropano, kaj Jakobo aŭstraliano. Strange, ĉu, ke ili kune povas amiki. Vi opinias, ke Johano scipovas perfekte angle. Eraro! Jakobo parolas preskaŭ same bone ĉeĥe kiel Johano, eĉ se li naskiĝis en Melburno, ĉar ambaŭ gepatroj estas ĉeĥoj. Ili ĉiuj tri estis vizite en Prago, ili loĝis ĉe la gepatroj de Johano en Vyšehrad, la buboj amikiĝis. Ili havas komunajn hobiajn, interregn, eksperimentojn, nu vi scias imagi tion.

Sur la muregoj de Vyšehrad ili travagaĉis ĉiujn angulojn, sed tio ne sufiĉis al ili. Ili esploris, kiel aspektis Vyšehrad dum praaj tempoj, kaj ili ŝatus vidi tiamajn historiajn konstruaĵojn bele en la realo. Altiris ilin la tempo, kiam Vyšehrad ankoraŭ ne estis militista fortikaĵo el la 17-a jarcento. Kiam ĝi ne aspektis kiel hodiaŭ. Kiam estis ĉi tie burgo, dum la regado de la unua ĉeĥa reĝo Vladislao II. reĝa burdo, kaj ĉirkaŭburga urbeto. Tio estis ankoraŭ la romanika periodo. Mirinde, ke el tiu tempo restis pentrinda preĝejo, la rotundo de sankta Marteno. Ĝi estas el la dekunua jarcento! Rotondo estas nomataj konstruaĵoj, kiam ili estas rondformaj. Tiom malnovaj sendifektaj preĝejoj estas en Prago nur tri, ĉiuj rotondoj. Sed ne pensu, ke rondformaj estis tiam ĉiuj konstruaĵoj. Burgoj rondformaj ne estis. Vi vidas sur ili, ankaŭ sur la rotundo, kiel oni tiam konstruis. Fenestroj estis supre rondaj, kaj ofte ili estis disduigitaj per koloneto. Multe pli malfrue, ie du-tri jarcentoj pli malfrue, staris en la ĉirkaŭburga urbeto Vyšehrad multaj belegaj domoj gotikaj. Tio estas tiuj konstruaĵoj, kiuj havas fenestrojn supre kun ogivo. La posedantoj de tiuj ĉi domoj plejparte havis rajton fari bieron. Kaj tion multaj praganoj enviis al ili.

Bedaŭrinde, por Vyšehrad oni batalis. Plej multe ĝi estis difektita post la batalo en la jaro 1420, kiam forlasis ĝin la malsatiĝinta garnizono de Sigismundo kaj kapitulacis antaŭ husanoj sur Pankrác. Se vi ion ankoraŭ ne scias, do la husana periodo estas en la ĉeĥa historio tre grava. Husanoj batalis kontraŭ la granda maljusteco, ili ne volis kiel rezón la malfidelan. Sigismundon, kiu ĉeĥojn perfidis, kaj ili sieĝis lian garnizonon en Vyšehrad. Post la foriro de solduloj, de tiu ĉi dungosoldataro de Sigismundo, enpenetris al Vyšehrad sovaĝaj hordoj de sube... el la Nova Urbo de Prago. Sekve la gotikan Vyšehrad ne ruinigis husanoj, tion fartis praganoj, ĵaluzantaj pri la bierfarejaj rajtuloj.

Jakobo kaj Johano ŝatus la mezepokan Vyšehrad riveli el la pasinteco en la nuntempon. Sed kiel... Iom ili sukcesis, ili povis renovigi Špička, la pordegon de Vyšehrad, kiu troviĝis inter la nunaj pordegoj Leopoldova kaj Táborská. Ili povis virtuale renovigi ĝin, ĉar sur Petřín staras ĝia imitaĵo proksime de la rigardoturo. Fakte restis post ĝi nur la komenco de la volbaĵo... Sen pripense malkonstruigis ĝin sinjoroj inĝenieroj nur en la jaro 1860, por ke ĝi laŭdire ne obstaklu al trafiko.

Sed tiam ja estis jam klare, ke tra la fortikaĵo de Vyšehrad la ĉefa vetur vojo ne kondukos ke ĝi flankeniĝos ĝis tie, kie nun situas la Ponto de Nusled, kaj kio pli, eĉ tiun ĉi vojon transportistoj forlasos, tuj kiam estiĝos la ĉefa rondvojo ĉirkaŭ Prago. Tute ne tra Vyšehrad!

La buboj klopodis laŭ diversaj malnovaj desegnaĵoj, kiujn oni nomas vedutoj, riveli unuopajn konstruaĵojn kaj kunmeti el ili la virtualan Vyšehrad, sed de la komenco ili ne multe progresis. La vedutoj ne estis precizuj, la konstruado senĉese ŝanĝiĝis... Sed male ili malkovris bonan fonton en la Legendoj de Vyšehrad de Popelka Biliánová pri tio, kiel Vyšehrad aspektis ne nur en la komenco de la dudeka jarcento, kiam Popelka Biliánová vivis kaj loĝis en dometo proksime al la estinta Ŝpička, sed ankaŭ longe antaŭ tio. Kaj en la legendoj ili trovis ankaŭ „Danco de blankaj virgulinoj“. Ili konsterniĝis.

Do la misteraj bildoj en kampoj ne estas enigmo nur nuntempa. Tiaspecaj fenomenoj aperadis jam iam... Do vi kune kun Johano kaj Jakobo trairu almenaŭ koncize la rakontadon de Popelka Biliánová, por mem distingi, kio povus esti en legendo la reala evento, por kiu ne ekzistas klarigo ĝis nun, kaj kion eble aldonis rakontantoj, por ke tio plaĉu al la scivolemaj aŭskultantoj. Popelka Biliánová, kiu mortis en la jaro 1941, parolas per malnovtempa ĉarmo...

## ***Danco de blankaj virgulinoj.***

*Sur Ludvo ĉe la armilejo, post ruiniĝo de la reĝa palaco, laŭdire estis kultivataj legomoj, kiu laŭdinda kutimo konserviĝis ĉi tie ankaŭ en la pasinta jarcento. Kaj dum la serenaj kaj varmaj noktoj someraj laŭdire ĉi tie sur la fortikaĵo de la detruita palaco de princoj kaj reĝoj ĉeĥaj aperadis vicoj da blankaj virgulinoj, kiu kantis tristajn kantojn, kiujn nenio komprenis, kaj prezentis strangajn dancojn ...*

*Dum varmaj noktoj ne valoras al ĝardenisto iri hejmen dormi, eblas akvumi seninterrompe. Tiel faris ankaŭ la legomkultivisto. Nur por momento li sidigis sin en la herbon, por ripozi. Kaj dum li sidas, subite kvazaŭ svarmo da cignoj alimpetas. La ĝardenisto levis la okulojn – kaj ili ne estis cignoj, sed blankaj virgulinoj. Ĉiuj havis blankajn robojn, harojn disligitajn kaj ŝvebis en la aero kiel nebulo.*

*Antaŭ la ĝardenisto rekonsciĝis, la blankaj virgulinoj ekprenis sin je manoj kaj dancis en la aero kiel lanugeroj kaj kantis al tio tiam funebrajn kantojn, ĝis la koro de l' ĝardenisto preskaŭ krevis. Ili dancis preskaŭ nur en la aero. Tuj kiam batis la unua horo, ili malaperis kiel fumo...*

*La ĝardenisto estis stupora kaj ne akvumis plu. Kaj kiam la suno leviĝis, li vidis sur la legomoj, kie la blankaj virgulinoj nokte dancis, ke la legomaj ja ne estis piedfrapitaj, sed ĉiuj kliniĝintaj al la tero unudirekte en formo de rondo, kvazaŭ ilin pluvo kaj vento al la tero vipkurbigus.*

*Kaj la legomoj ja kreskis, sed ili ne plu leviĝis kaj restis tiel kliniĝintaj en vasta rondo dum la tuta somero.*

*La blankaj virgulinoj onidire dancadis ĉi tie dum la lunhelaj noktoj ĉiam, kaj pro tio en tiuj ĉi lokoj onidire neniu legomoj kreskis rekte.*

*Sed ili ne venadis al la formortinta fortikaĵo de la malnovaj Premislidoj nur dum la varmaj noktoj someraj... Foje en vintro falis tiom da neĝo, ke soldatoj devis en la neĝo vojojn ŝoveli, por povi veni al la destinita gardposteno. Kaj soldato en la ŝovelita vojo staris ĝisbruste kaŝita de neĝo. Kaj tuj nokte eksplodis sovaĝa neĝoŝtormo en Vyšehrad, ĝi preskaŭ forbalatis konstruaĵojn de sur la tera surfaco, tiom pli la neĝon el la vojoj elfositan. En momento la neĝoŝtormo blovplenis la peze ŝovelitan vojon kaj la neĝo en sovaĝa blovado pleis sin kvazaŭ en frostiĝinta antaŭinfero.*

*Soldato enpaŝis garbudon, rapide paŝetadas tie por ne frostiĝi kaj rigardas. La luno, estas vero, lumis, sed pro la neĝblovado ne trapenetris multe da ĝia lumo al la tero. Precipe en centro de la korto de la fortikaĵo kirliĝis la neĝo alten, pelata kiel diabla nupto. Sed subite ĝi kuŝiĝis tujmomente kaj nur en la centro de la fortikaĵo ĝi ankoraŭ kirliĝis en sovaĝa turniĝado.*

*La soldato elrigardas el la budo kaj jen li vidas, ke ne kirliĝas neĝo, sed vicoj da virgulinoj blankaj. Vestitaj ili estis en nebulaj roboj kaj estis travideblaj iliaj korej, blankaj kiel glacio. Kaj la nebulroboj pendis ĝis la neĝo, kaj dum ili dancis, la neĝo kirliĝis post la nebulroboj kiel nubo. Matene estis ĉio en la fortikaĵo blovkovrita per unueca neĝa tapiŝo, nur en la centro estis elbalaita blanka rondo...*

*Eĉ aŭtuno aperas la blankaj virgulinoj en la fortikaĵo kaj elŝoviĝas el peza nebulo, sed tiam ili ne dancas en vigla rondtumulto, sed ili peze treniĝas sur la tero kaj fine malĝojece plorante ili disiĝas je nenio... Eble ili priploras la ruiniĝon de la malnova Vyšehrad dum la novembraĵ tagoj en la malfeliĉa jaro 1420.*

Ĉi tie finiĝas la legendo, kiel notis ĝin Popelka Biliánová.

Vi rimarkis, ke en Vyšehrad neĝon ŝovelis soldatoj, ĉu. En la Fortreso rekte en la fortikaĵo staris ĝis la jaro 1927, kiam ĝi forbrulis, militista konstruaĵo, citadelo. Nun estas tie kvadrata parko. Stara sen ĝi kvar statuoj de Myslbek laŭ motivoj de Malnovaj ĉeĥaj mitoj de Jirásek. Origine ili staris sur la Palacký-ponto, sed ĝi estis en la dua mondmilito dum flugatako difektita kaj la statuoj staras nun ĉi tie.

Kaj kiel konstante ŝanĝiĝis ĉio, kio estas inter la muregoj de Vyšehrad. Kiam tie eble unuafoje dancis la blankaj virgulinoj... Eble ankoraŭ pli frue, ol estiĝis la fortikaĵo de Vyšehrad. Ĝis kiam legendo ne estas enskribita, la rakontantoj ŝanĝas ĝian enhavon, kaj tial al tio, ke sur Vyšehrad kreskis fleksiĝintaj legomoj, oni elpensis iam blankajn virgulinojn kaj pli poste soldatojn gardostarantajn...

Per la konstruo de la fortikaĵo Vyšehrad tre ŝanĝiĝis. La flanko de la masivo de Vyšehrad altigis taluso, ankaŭ la vojo kondukis tra alia loko, la origina malsupra pordego estas masonfermita. Kondukis de ĝi malsupren mallarĝa veturvojo al Vratislavova-strato tre abrupte. Kaj tra la nuntempa Cihelná-strato faras la vojeto kurbiĝon. La fortikaĵo estas bela, pinkava, sed eble estas domaĝe, ke dum ĝia konstruado estis ŝutkovritaj la restaĵoj de mezepokaj konstruaĵoj.

